JARA RAPORTO DE TEJO
ESTRARO KAJ KOMISIITOJ 2008

TEJO - Tutmonda Esperantista Junulara Organizo

Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam

Nerderlando

Kompilita de Anna-Laura Haber Wickstrøm

Ĝenerala Sekretario de TEJO

Zuriko, 6a aŭgusto 2008

Enhavo

1 Antaŭparolo
raportas Anna-Laura H. Wickstrøm, Ĝenerala Sekretario **3**

2 Enkonduko
raportas Gregor Hinker, prezidanto, estrarano pri KER **4**

3 Administrado
raportas Anna-Laura H. Wickstrøm, Ĝenerala Sekretario **4**

4 Membroj
raportas Anna-Laura H. Wickstrøm, Ĝenerala Sekretario **5**

5 Financoj
raportas Sergeo Tyrin, kasisto, kaj Katharina Ignatieva **6**

6 Landa Agado
raportas Rogener Pavinski, estrarano pri Landa Agado **6**

7 Eksteraj rilatoj
raportas Gregor Hinker, estrarano pri KER, prezidanto **8**

8 IJK
raportas Vildana Delalić, estrarano pri kongresoj, seminarioj kaj Aktivula Trejnado **9**

9 Centra Oficejo
raportas Julia Noe, TEJO-volontulino **9**

10 Informado **10**
10.1 KRETO
raportas Chuck Smith, komisiito pri reta informado 10
10.2 KAPRi
raportas Felix Zesch, komisiito pri amaskomunikiloj kaj publikaj rilatoj 10

11 Pasporta Servo
raportas Julia Noe, TEJO-volontulino **12**

12 TEJO Tutmonde

raportas Marcos Cramer, komisiito redaktoro de TEJO Tutmonde 13

13 Kontakto

raportas Paŭlo Moĵajev, komisiito redaktanto de Kontakto 13

14 Listo de mallongigoj 14

1 Antaŭparolo

raportas Anna-Laura H. Wickstrøm, Ĝenerala Sekretario

En la jaro 2007 la nova estraro de TEJO ne estis elektita dum la IJK, ĉar mankis la necesa kvorumo por ke komitata kunsido elektu estraron.

La ofica periodo de la estraro finiĝas kiam nova estraro de TEJO estos elektita. Pro tio, la ofico de estraro prezidata de Thorbjørnsen-Wickström finiĝis nur en decembro, kiam dum la komitata kunsido de TEJO – dum IS en Würzburg (Germanio) – nova estraro de TEJO estis elektita. Tiu ĉi jarraporto de la TEJO-estraro, pro ne kutima longeco de estrara periodo, rilatas al la agado de januaro 2008 ĝis la fino de majo 2008.

Jen resumo pri la agado de septembro 2007 ĝis decembro 2007:

Komence de aŭgusto 2007 David-Emil WICKSTRÖM demisiis, eliris la TEJO-estraron kaj transdonis la prezidantajn taskojn al Haris SUBAŠIĆ. Post la transdono de la posteno, TEJO restis senkapa ĝis la nova elekto de estraro fine de decembro.

En aŭgusto Haris prezentis na TEJO dum la IJK en Hanojo kaj la estraro elektis na Hungario kiel gastiganta lando por la IJK 2008.

En septembro la estraro elektis na Julia NOE kiel posteulon de Katarzyna MARCINIK kiel volontulo de TEJO en la Centra Oficejo: Koran dankon al Katarzyna pro elstara laboro por TEJO. Haris reprezentis na TEJO en la FOJE kunveno en Lisabon.

En oktobro Valentina SIDOROVA demisiis kiel Ĝenerala Sekretario de TEJO kaj eliris la estraron. Anna-Laura H. WICKSTRØM – kiel malmembro de la estraro - transprenis la neprajn taskojn de Ĝenerala Sekretario – ĉefe por ebligi kvoruman komitatan kunsidon dum la IS por elekti novan estraron de TEJO. Katarzyna kaj Julia partoprenis trejntagon pri subvencioj en Bruselo. Estelle LOISEAU kaj Gregor HINKER partoprenis la UNESCO forumon en Parizo.

En novembro Julia transprenis la oficon de volontulo por TEJO en la Centra Oficejo. Gregor partoprenis la FOJE forumon en Bruselo. Julia prezentis na TEJO dum la malferma tago en la Centra Oficejo.

En decembro okazis kvoruma komitata kunveno de TEJO dum la IS en Würzburg, kie la nova estraro de TEJO elektiĝis kaj la periodo de la antaŭa estraro ankaŭ oficiale finiĝis.

2 Enkonduko

raportas Gregor Hinker, prezidanto, estrarano pri KER

Prezentante al vi tiun-ĉi jarraporton, ni kiel estraro kaj komisiitoj de TEJO troviĝas en malkutima situacio: laŭ nia percepto, ni nun estas nur je la fino de transira enoficiĝa periodo, kaj jam ni raportu pri pasinta jaro. Tiu truo en la percepto, kiun supozeble kunhavas anoj kaj observantoj de TEJO, rezultas el la kondiĉoj menciitaj en la antaŭparolo.

3 Administrado

raportas Anna-Laura H. Wickstrøm, Ĝenerala Sekretario

Je malfruo de preskaŭ duona jaro, la nova estraro de TEJO estis elektita fine de decembro dum la IS en Würzburg, Germanio.

Elektita estis tute nova kvin-kapa estraro, kun jenaj membroj: Gregor HINKER (Prezidanto, KER), Anna-Laura H. WICKSTRØM (Ĝenerala Sekretario), Sergej TYRIN (Kasisto, 2a Vicprezidanto), Rogener PAVINSKI (Landa Agado, 3a Vicprezidanto), Vildana DELALIĆ (IJK, 1a Vicprezidanto).

La nova estraro jam kvarfoje renkontiĝis en RetEsKu (en januaro, marto, aprilo kaj komence de junio) kaj fizike kunvenis por tritaga EsKu en la CO la 14-an ĝis la 16-an de marto.

Pri la laboro de la estraro la estraranoj regule raportis al la komitato en la regule aperanta monata retrevuo Komitata Cirkulero.

La aro de komisionoj kreskis per la aldono de du novaj komisionoj: komisiono pri reta informado (KRETA) kaj komisiono pri amaskomunikilo kaj publikaj rilatoj (KAPRi). Chuck SMITH, antaŭa estrarano pri Informado, iĝis komisiito pri KRETA kaj Felix ZESCH gvidas na KAPRi.

La redaktoroj de KONTAKTO kaj TEJO-Tutmonde daŭrigis sian laboron. Por la reta revuo TEJO-aktuale Julia NOE kaj Gregor HINKER transprenis la redaktadon, por garantii daŭran aperon de la revuo, sed serĉas novan redaktoron.

Ekde novembro 2007 en Centra Oficejo de UEA por TEJO volontulumas Julia NOE.

Komitato, elektita printempe 2006 kaj kiu oficis ĝis la 31a de majo 2008 havis du laborsesiojn dum IS en Würzburg. La protokolo troviĝas je

http://www.tejo.org/vikio/Komitatkunsido_Dum_IS_2007/2008
Maksimume, ni havis 19 voĉojn kaj partoprenis gastoj sen voĉoj. Komitatanoj elektis novan estraron, decidis pri reta voĉdono en la komitato, diskutis en grupoj informadan strategion, retaj elekteblecoj kaj la statuto de JEBUO (Junulara Esperantista Burundia Organizo). La Komitato aprobis Jaran Raporton 2006-2007.

En majo 2008 estis elektitaj tri komitatanoj B por la komitata periodo 2008-2010: Irmina SZUSTAK, Nicola RUGGIERO kaj Oleksandra KOVYAZINA (ĉar TEJO rajtas al kvar komitatanoj B por la onta periodo, la tri kandidatoj estis aŭtomate akceptitaj).

Por la periodo 2007 – 2010 TEJO-n en UEA-Komitato reprezentos Peter BALAŽ kaj Haris SUBAŠIĆ.

4 Membroj

raportas Anna-Laura H. Wickstrøm, Ĝenerala Sekretario

En la suba tabularo ni vidas ke la kvanto de individuaj membroj de TEJO rapide malkreskis en 2007. La plej grandaj malkreskoj troviĝas ĉe eŭropaj landaj sekcioj (LS-oj), tio ŝajnas rilati al la neeŭropa IJK, kie multaj kutime (re)membriĝas.

Tamen la malkresko ankaŭ estas indiko, ke inter niaj 1959 aligitaj membroj, nur malmultaj scias pri sia tegmenta organizo.

En 2007 la individuaj membroj de TEJO sin indikis kiel loĝantoj de 74 ŝtatoj kaj unu senŝtata (en 2006: 77 ŝtatoj).

Membro-kategorio	Kodo
Junaj Membroj kun Jarlibro	MJ-T
Junaj Membroj-Abonantoj (+revuoEo)	MA(T)
Junaj Dumvivaj Membroj	DMT
Junaj Dumvivaj Membroj kun jarlibro	DMJ(T)
Sumo Individuaj Membroj	IM
Dumvivaj Patronoj	DPT
Unujaraj patronoj	PT

Kodo	2007	2006	2005	2004	2003	2002	2001	2000	1999	1998	1997	1996
MJ-T	229	342	361	267	231	235	337	350	451	451	598	550
MA(T)	128	132	131	137	139	161	201	241	220	260	277	274
DMT	24	25	24	24	23	18	19	19	17	17	17	19
DMJ(T)	13	16	13	15	6	5						
IM	394	515	529	443	399	419	557	610	688	728	892	843
DPT	22	21	21	21	18	17	17	17	14	13	12	11
PT	60	64	64	76	81	82	90	94	96	100	101	108

Lando	2007	2006	Diferenco	Lando	2007	2006	Diferenco
Afganio	2	1	1	Latvio	1	1	0
Alĝerio	1	1	0	Litovio	3	5	-2
Andoro	0	1	-1	Madagaskaro	3	7	-4
Argentino	4	3	1	Malavio	2	5	-3
Armenio	0	1	-1	Meksiko	5	8	-3
Aŭstralio	5	1	4	Moldavio	4	3	1
Aŭstrio	4	6	-2	Mongolio	1	2	-1
Belgio	10	14	-4	Nederlando	9	13	-4
Benino	3	1	2	Nepalo	0	2	-2
Bjelorusio	1	1	0	Niĝerio	1	2	-1
Bosnio-Hercegovino	2	7	-5	Niĝerlando	1	4	-3
Brazilo	22	26	-4	Nikaragvo	0	0	0
Britio	8	15	-7	Norvegio	1	3	-2
Bulgario	3	4	-1	Nov-Zelando	1	0	1
Burundio	1	1	0	Pakistano	0	0	0
Ĉadio	1	1	0	Panamo	0	1	-1
Ĉeĥio	4	7	-3	Peruo	1	1	0
Ĉilio	3	2	1	Pollando	5	14	-9
Ĉinio	4	3	1	Portugalio	0	2	-2
Danio	6	8	-2	Rumanio	1	1	0
Domingo	1	1	0	Rusio	26	38	-12
Ekvadoro	0	0	0	Salvadoro	1	1	0
Estonio	1	2	-1	Senŝtata	1	0	1
Finnlando	7	8	-1	Serbio	3	5	-2
Francio	27	49	-22	Slovakio	7	4	3
Ganao	0	1	-1	Slovenio	1	3	-2
Germanio	29	40	-11	Srilanko	1	0	1
Hispanio	4	22	-18	Sud-Afriko	1	1	0
Hungario	6	14	-8	Sud-Koreio	0	2	-2
Irano	9	8	1	Svedio	14	11	3
Irlando	1	1	0	Svislando	4	6	-2
Islando	1	1	0	Taĝikio	3	3	0
Israelo	10	11	-1	Tajlando	1	0	1
Italio	10	19	-9	Tajvano	4	7	-3
Japanio	37	12	25	Tanzanio	1	1	0
Jordanio	1	1	0	Togolando	5	5	0
Kanado	3	2	1	Tunizio	1	0	1
Kazaĥio	4	4	0	Ukrainio	5	6	-1
Kirgizio	1	0	1	Unuiĝintaj Arabaj Emiratoj	0	1	-1
Kolombio	1	1	0	Urugvajo	1	1	0
Kongo, DR	4	0	4	Usono	13	20	-7
Kostariko	0	2	-2	Venezuelo	1	1	0
Kroatio	3	10	-7	Vjetnamio	13	9	4
Kubo	3	3	0		**393**	**515**	**-122**

5 Financoj

raportas Sergeo Tyrin, kasisto, kaj Katharina Ignatieva

Vidu la financan raporton en aparta dokumento ‘Financa Jarraporto 2007 ’

6 Landa Agado

raportas Rogener Pavinski, estrarano pri Landa Agado

:

Novaj Landaj Sekcioj

Ni kontaktis kelkajn Landajn Sekciojn kaj kelkajn aktivulojn interesatajn revivigi aŭ fondi novan Landan Sekcion de TEJO.

En Meksiko nuntempe aktivas grupo, kiu planas realiĝi kiel Landa Sekcio. TEJO havis Landan Sekcion en Meksiko ĝis 1981. Nun estas nova ŝanco, ke la Meksika Esperanto Junularo kiu jam aktivas ene de la Meksika Esperanto-Federacio povu fariĝi denove LS de TEJO.

En Peruo antaŭ nelonge aperis raporto pri Esperanto en ĵurnalo kun emfazo pri la junulara agado. De tiam ni ekis kontakton, por koni kiel statas la agado tie, kaj eble estonte ni povus havi ankaŭ novan Landan Sekcion en Peruo.

JEBUO (Junulara Esperantista Burundia Organizo) jam en pasinta Komitatkunveno proponis aliĝon kiel LS de TEJO. Tiam ĝia statuto ne estis aprobita de la Komitato, kiu proponis ŝanĝojn kaj plibonigojn. Nun, JEBUO refoje proponas sian reformulitan statuton al la Komitato, kiu ĝin analizos dum IJK-2008.

Partoprenu IJK

Ni lanĉis alvokon por konkurso Partoprenu IJK-n ĉi-jare, kiu celas finance subteni la partoprenon de kelkaj niaj membroj en IJK. Bedaŭrinde la unua alvoko estis iomete malfrue kun ne granda limdato, pro tio ni poste pligrandigis la limdaton. Venis proponoj kaj la estraro faris sian decidon.

Komitatanoj

Finde de majo okazis la nomumo de la Komitatanoj A kaj B de TEJO. En 2008 estas 27 Komitatanoj A (2 pliaj kompare al 2007) kaj 3 Komitatanoj B (1 plia kompare al 2007). Komence de la periodo por la nova Komitato, venis pliaj kontribuoj en la Komitata rondo ol kutime, kio espereble anoncas aktivan Komitaton.

Bedaŭrinde, tamen normala afero estas ke kelkaj gravaj LS-oj nuntempe malaktivas kiel ekzemple REJM (Rusia Esperantista Junulara Movado) kaj USEJ (USona Esperantista Junularo). Pro tio, kaj por pli profunde koni la planojn kaj problemojn de niaj Landaj Sekcioj, kaj por pli bone scii kiel rilatu al ili, ni

planas baldaŭ krei ampleksan demandaron al LS kaj Komitatanoj.

Ceteraj

Mi reprezentis TEJO-n en Ĵunarlista Kongreso en Vilnius en majo kaj sendis etan raporton al la komitato.

7 Eksteraj rilatoj

raportas Gregor Hinker, estrarano pri KER, prezidanto

La laboro de la Komisiono pri Eksteraj Rilatoj (KER) fokusiĝis je du kampoj: Je la reprezentado de TEJO en internaciaj forumoj kaj je la klopodo kunlabori kun neesperantistaj junularaj organizoj kadre de projektoj kaj aktivula trejnado.

La reprezentado en internaciaj forumoj baziĝas je kontinueco de la laboro de multaj generacioj de KER-aktivuloj. Ĉefa aktivecero estas la Forumo de la Junularo Eŭropa (FoJE, Youth Forum Jeunesse YFJ). En la FoJE membras pli ol 90 internaciaj neregistaraj junularaj organizoj kaj naciaj junularaj forumoj; ĝi estas pli kaj pli rekonita kiel serioza partnero kaj centro de kompetento je eŭropa nivelo pri junularaj aferoj. Ĝiaj grandaj avantaĝoj estas, ke ĝi permesas al siaj membroj krei retojn inter si, komune opiniumi en eŭroppolitikaj aferoj kaj interkonsenti pri komunaj vidpunktoj. Dufoje po jaro FoJE invitas al membraj kunvenoj (COMMEM). En ambaŭ kunvenoj de la raportperiodo (novembro 2007: Bruselo; majo 2008: Barcelono) mi reprezentis TEJOn.

Pli eksterordinara estis la Junulara Forumo de UNESKO (Unuiĝint-Naciara Edukada, Scienca kaj Kultura Organizo), kiu okazas kadre de la kunveno de la membraj ŝtatoj de UNESKO. Estelle LOISEAU kaj mi reprezentis TEJOn dum la kunsidoj kaj disdonis informilojn ĉe propra informbudo.

Cetere, kadre de flegado de la rilatoj kun UEA kaj ILEI, mi partoprenis en kunvenoj de la estraroj en Roterdamo (aprilo 2008) kaj Budapeŝto (marto 2008).

8 IJK

raportas Vildana Delalić, estrarano pri kongresoj, seminarioj kaj Aktivula Trejnado

Kvankam nia agado kiel estraranoj de TEJO komenciĝis nur 5 monatoj antaŭe, la estraro jam faris multon. Mi okupiĝas pri TEJO-aranĝoj, do Internacia Junulara Kongreso, seminarioj kaj aliaj aranĝoj.

Kiel konata, IJK ĉijare okazas en hungara urbo Szombathely. Ekde komenco de mia posteno kiel TEJO-estrarano mi havas kontakton kun la Loka Kongresa Komitato de IJK. La organizado de IJK iras glate kaj promesas jam tre sukcesan kongreson.

Dum pasintaj monatoj mi havis kontakton kun kandidatoj por IJK 2009 kaj post la ricevo de kandidatiĝoj, longa cerbumado kaj iom da debatoj, la loko de IJK-2009 estis decidita kaj estos la urbo Liberec en Ĉeĥio.

Mi ankaŭ okupiĝas pri aktualigado de broŝuroj, kiuj helpas organizi aranĝojn, kiel ekzemple la broŝuro 'Kiel organizi IJK'.

Krome, dum pasintaj 5 monatoj kiel TEJO estrarano, mi partoprenis ĉiujn retajn kunsidojn kaj bedaŭrinde la fizikan kunsidon ne sukcesis partopreni, sekvis mian korespondadon kun organizantoj de IJK, kaj partoprenis semajnajn diskutojn en TEJO-listo kaj aranĝis rabaton por TEJO-membroj dum Ago Semajno (AS).

9 Centra Oficejo

raportas Julia Noe, TEJO-volontulino

En la jaro 2007 komenciĝis mia volontulado por TEJO en la Centra Oficejo en Roterdamo. Tiel, ekde la 12a de novembro, mi helpas la estraron realigi siajn taskojn. Jen eta superrigardo:

En la oficejo mi ordigis la dosierojn, umis per komputilo, ordigis poŝton, kreis necesajn dosierojn, helpis al Roy McCOY (oficisto de UEA, kiu resondecas pri Jarlibro kaj prespretigado) serĉi informojn pri Landaj Sekcioj (kaj aliaj informoj pri TEJO) por TEJO paĝoj en Jarlibro 2008, dissendis la leterojn al patronoj de TEJO farita de Anna-Laura kaj Gregor, traktas ĉiutagajn retmesaĝojn kaj aliajn poŝtaĵojn de la TEJO-oficejo, voĉlegis el la revuoj Esperanto, Kontakto kaj TEJO-Tutmonde, preparis komitatkunsidajn dokumentojn laŭ peto de

Anna-Laura, preparis estrarkunsidon en Roterdamo kun Anna-Laura, preparis kvizon kaj prelegon por la Malferma Tago kun Gregor, ĝisdatigis retpaĝon kaj vikiojn, aperigis novajn lingvojn en la retpaĝaro, dissendis remembriĝalvokon al malnovaj TEJO-membroj, redaktas kaj dissendas TEJO-aktuale.

Mi reprezentis na TEJO dum la Internacia Seminario (IS), kiu okazis en Würzburg en Germanio. Tie pretigis la informbudon de TEJO kaj preparis raporton pri pagoj dum IS.

10 Informado

10.1 KRETO

raportas Chuck Smith, komisiito pri reta informado

TEJO.org nuntempe bezonas tradukantojn al pluraj lingvoj, por ke ni estu vere tutmonda. Mi feliĉas ke ni uzas Drupalon, kiu ankaŭ estas la plej populara Enhav-Mastruma Sistemo (EMS) kaj eblas havi plurlingvan retejon per ĝi kiel videblas ĉe www.esperanto.info kiu ankaŭ estas farata per Drupal. Nuntempe la retejo estas iom kaosa, sed Joop EGGEN multe laboras por plibonigi ĝin.

En la informada fako, mi vere sentas la bezonon por pli multe da paperaj materialoj, por ke ni povu pli bone reprezenti nin ĉe konferencoj kaj foiroj. Cetere, mi longe diskutis kun Derk EDERVEEN pri la ideo havi retan administran sistemon por Pasporta Servo por ke ni povu multe plifaciligi ŝanĝadon de datumoj por gastigantoj kaj samtempe malpliigi la laboron de Derk. Se vi interesiĝas pri tiu tasko, vi povas rekte kontakti Joop aŭ la estraron pri tio. Resume, neniu revolucia okazis dum la lasta periodo de la TEJO-estraro, sed simple pli evoluiga.

10.2 KAPRi

raportas Felix Zesch, komisiito pri amaskomunikiloj kaj publikaj rilatoj

Kreado de la komisiono kaj ties taskoj

Ekde la komenco de la jaro 2008 ekzistas en TEJO nova komisiono kun la nomo 'Komisiono pri Amaskomunikiloj kaj Publikaj Rilatoj', mallongigo KAPRi. La supera celo de la komisiono estas kreado de korporacia identeco de TEJO. Tiu

respeguliĝu en konkretaj tuŝeblaĵoj. La ĉefaj taskoj dum la oficperiodo estos:

- la plilaborado de la interreta paĝaro, interalie ties multlingvigo, kunlabore kun la komisiono pri reta agado (KRETO) gvidata de Chuck SMITH
- la kreado de broŝuro disdonebla al aliaj organizaĵoj, ĉefe en la kadro de la Eŭropa Junulara Forumo (EYF - European Youth Forum)
- la kreado de adreskartetoj utiligotaj en kontaktoj kun la reprezentantoj de aliaj junularaj organizaĵoj
- opcia tasko: Verkado de TEJO-kateĥismo kun oficialaj respondoj al demandoj pri TEJO, donindaj dum intervjuoj aŭ interparoloj kun aliaj organizaĵoj

Anoj de la komisiono

Komisiita far la estraro por la gvidado de la komisiono estis Felix ZESCH, Germanio. La komisionon krome anas Julia LITVINOVA, Rusio/Belgio kaj Nastja KOĴEVNIKOVA, Rusio/Danio.

Rezultoj

La laboro ĝis la redakto de tiu ĉi raporto ankoraŭ ne kreis rezultojn. Ĉefe pro neatendite multa profesia laboro por la komisionestro. Ankaŭ lia engaĝiĝo en la landa sekcio prenis multe da Esperantodediĉita tempo de la komisionestro. Aliaj faktoroj por ĝisnuna nesukceso estis:

- miskomprenoj pri la celo de la broŝuro, la ambicia plano por la kreado kreita komence de la oficperiodo, ne povis esti tenata.
- Manko de komunikado de adresdatumoj far la estraranoj por la adreskartoj
- Partopreno en laborkunsido pri Aktuale.info

La komisionestro partoprenis kunsidon pri la projekto 'Aktuale.info', kiu celas krei multlingvan informretejon pri Esperantorilataj novaĵoj por la ekstera mondo. Pri tiu ĉi kunsido en Poznano, Pollando, la komisionestro raportis skribe al la estraro.
Raportero:

‘Aktuale.info celas esti la plej abunda kaj plej informriĉa interreta informejo pri Esperantorilataj aferoj. Ĝi disponigu siajn informojn en multaj lingvoj, tradukojn prizorgu volontuloj. En Aktuale.info estos tradukataj novaĵoj kaj artikoloj el kaj al diversaj lingvoj. La bazo estas aŭ nacilingva propono aŭ Esperantlingva propono. Krome troviĝos en la paĝaro kolekto de utilaj informoj por interesatoj kaj ĵurnalistoj. Tiuj informoj ne nepre devas esti integra ero de aktuale.info, sed ankaŭ povas esti uzataj per ligilo.

La origina ideo ekestis, kiam evidentiĝis granda bezono de lernu!-uzantoj informi pri novaĵoj. Kvankam la lernu!-paĝaro estas teknike tre progresinta, ĝi ne povas ankoraŭ transpreni tiun ĉi funkcion. Aktuale.info plenigu ĝin do. Eblos alŝuti nacilingvajn (kun Esperantlingva resumo) kaj Esperantlingvajn artikolojn, kiuj poste povus esti tradukotaj al aliaj lingvoj. Krome eblos preni materialon de aktuale.info al naciaj gazetoj, kaze ke mankas artikoloj.’

La celo de la kunsido estis planado de la plua projekto kaj pretigo de projektplano, kiu servu kiel dokumento por la monpetado por la realigfazo de la projekto, kiu (estis akceptita kaj) estos financata far Esperantic Studies Foundation. Pluaj progresoj en tiu ĉi grava projekto estas ĝisdate ne raportindaj. Naciaj aktivuloj por la projektoj, kiuj okaze ankaŭ povas esti pagataj, estas serĉataj.

11 Pasporta Servo

raportas Julia Noe, TEJO-volontulino

Pasporta Servo fidele aperadas. Eldono 2008 aperis kun malfruiĝo en aprilo, presita de eldonejo NEPO (Maciej Wnuk) el Pollando. En ĝi vi trovos 1225 gastigantojn el 90 landoj kaj 24 mapojn. Ni daŭre uzas la administran sistemon reprogramitan en Microsoft Word, por faciligi kaj plifleksebligi la administradon. Jam pasintjare iom ŝanĝiĝis la aspekto kaj la simboloj, kio ŝparis pli ol 10% de la paĝoj. La nombro da gastigantoj kaj la nombro da landoj iomete malkreskis. Pasporta Servo daŭre spertas malfacilaĵojn kaj problemojn:

- duono de la landoj havas nur unu ĝis tri gastigantojn, kaj duono de la gastigantoj loĝas en nur dek landoj
- multaj gastigantoj ankaŭ ĉi-jare rezignis pri sia ‘senpaga’ ekzemplero kaj

libervole donacis monon, tamen daŭre necesas tia engaĝiĝo por teni Pasporta-n Servo-n nedeficita

- urĝe mankas persono kiu povus dediĉi iom da tempo al la 'eksteraj rilatoj' de Pasporta Servo, al pli aktiva vendado de la libro, kaj al enspezoj per donacoj, anoncoj ktp.

Ekde 2007 ekis la ebleco de elektronika adreslibro por gastigantoj, kiuj deziras tion, por tiumaniere ŝpari preskostojn kaj afrankojn. Pli da informojn vi trovos en la retejo de la Pasporta Servo (www.tejo.org/ps). Komisiito de Pasporta Servo estas Derk EDERVEEN.

12 TEJO Tutmonde

raportas Marcos Cramer, komisiito redaktoro de TEJO Tutmonde

TEJO Tutmonde (TT) daŭre aperis laŭ ĝia regula aperritmo ĉiun duan monaton. Fine de 2007 okazis iomaj malfruiĝoj en la dissendado de TT pro tio ke TT estas ĉiam sendata kune kun Kontakto, kiu estis pretigita kun malfruiĝo. La numero 2008-1 de TT estis dissendita sen Kontakto, kaj nun la TT ĉiam estas dissendata kune kun la antaŭa numero de Kontakto (do numero 2008-2 de TT estis dissendita kune kun numero 2008-1 de Kontakto).

Ekde numero 2008-2 ekzistas nova rubriko 'Esperanto en Interreto', al kiu ĉiu povas kontribui, prezentante interesan Esperantan retpaĝaron. Ankaŭ daŭre ekzistas la rubriko, en kiu TEJO-membroj povas prezenti sin mem.

Ofte venis nesufiĉe da kontribuoj. Mi tial devis plurfoje mem verki kontribuojn, aŭ reuzi materialon jam publikigitan aliloke. Estus bone, se la membroj de TEJO kontribuus pli multe al sia gazeto, por ke ĝi daŭre restu kieleble plej interesa.

13 Kontakto

raportas Paŭlo Moĵajev, komisiito redaktanto de Kontakto

Mi transprenis la redaktadon de 'Kontakto' aŭtune 2007. De tiu tempo sub mia gvido aperis la jenaj numeroj de la revuo:

- 220 (2007:4) kun la ĉeftemo 'Kune - por pli bona mondo'

- 221 (2007:5) kun la ĉeftemo ‘Ekologio’
- 222 (2007:6) kun la ĉeftemo ‘Literaturo’
- 223 (2008:1) kun la ĉeftemo ‘Neordinaraj hobioj’.

Krom mi mem al la preparado de la revuo kontribuas ankaŭ Ĵenja ZVEREVA-AMIS (antaŭa redaktanto de la revuo, kiu nun faras la grafikistan laboron) kaj Aleksandro GALKIN (kiel provleganto).

Bedaŭrinde la revuo daŭre aperas kun ĉ. 2-monata malfruiĝo (kiu malrapide kresketis jam pasintjare), kiun mi dume ne sukcesas forigi (tamen, mi ja penas fari tion kaj mi nepre faros). La ĉefa problemo daŭre estas manko de kontribuoj, tial mi alvokas ĉiujn interesitojn, ĉiujn ordinarajn TEJO-anojn: verku mem por la revuo pri la temoj, kiuj vin interesas kaj verkigu viajn amikojn kaj/aŭ lernantojn! La planitaj temoj estas:

- 224 (2008:2) – ‘Teknologioj kaj scienco’
- 225 (2008:3) – ’Edukado tra la mondo’
- 226 (2008:4) – ‘Politikaj unioj – ĉu vere unuecaj?’

Krome, okaze de la ĉi-jara jubileo de TEJO estas planata aperigi specialan teman numeron pri la historio de TEJO, pri ĝia nuntempo kaj futuro, pri ĝiaj problemoj kaj perspektivoj: do – pri TEJO ĝenerale. Tamen bonvenaj estas ankaŭ alitemaj kontribuoj! Mi estas malferma al ĉiaspeca kunlaboro kaj ĝoje akceptos ajnan helpon!

14 Listo de mallongigoj

Listo de mallongigoj

AS	Ago Semajno
CO	Centra Oficejo
EsKu	Estrara Kunsido
FOjE	Forumo de la Junularo Eŭropa
IJK	Internacia Junulara Kongreso
ILEI	Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj
IS	Internacia Seminario
JEBUO	Junularo Esperantisto de Burundio
KAPRi	Komisiono pri Amaskomunikilo kaj Publikaj Rilatoj
KER	Komisiono pri Eksteraj Rilatoj
KRetO	Komisiono pri Reta agado
LKK	Loka Kongresa Komitatao
LS	Landa Sekcio
PS	Pasporta Servo
REJM	Rusia Esperantista Junulara Movado
RetEsKu	Reta Estrara Kunsido
TEJO	Tutmonda Esperantista Junulara Organizo
TT	TEJO Tutmonde
UEA	Universala Esperanto-Asocio
UK	Universala Kongreso
UNESKO	Unuiĝint-Naciara Edukada, Scienca kaj Kultura Organizo
USEJ	USona Esperantista Junularo